



Go-Amiko

**Informilo de
Japana Esperantista Go-Asocio
N-ro 159, Aŭgusto 2020**



コロナで

八ヶ岳囲碁合宿も日本大会分科会も中止に

コロナウイルスの蔓延が止まりません。7月31日、今日は、東京で400人を超える感染者が出てしまい、どうなるのか全く想像もできません。八ヶ岳エスペラント館は、開館の見込みが立たず、今年は開館しないことを決め、したがって恒例の八ヶ岳囲碁合宿も開催不能になりました。

日本エスペラント大会は、9月中旬に開催の予定で、開催に向けて準備を進めていますが、果たして本当に開けるのかも心配です。参加者も少ないようなので、囲碁の分科会も中止にしました。

この機関誌も、4月号は、いくつかの国が受け取り拒否、ということで、外国向けのものが20近く戻ってきてしまいました。この号も、果たして全員の会員に届くか不安です。

Pro la epidemio de la koronaviruso la somera Go-kunsido ne okazis. La Japana Esperanto-Kongreso okazos en septembro kaj en ĝi kutime ni havas kunsidon, sed la partoprenantoj estos malmultaj, do ni decidis ne okazigi Go-kunsidon.

振込用紙同封の方は、会費 1000 円の納入をお願いします。

Goo kaj Corona-viruso en Germanujo

Malfacilaj tempoj por la germana goo: ekde meze de marto ĉi-tie en Germanujo komenciĝis la „lock-down“ (amaskvaranteno) – ne nur ĉe ni, ankaŭ en niaj najbaraj landoj kaj ĉie en la mondo. Ni germanoj havis feliĉon, ni ne havis/as tiom multe da malsanuloj kaj eĉ mortintoj kiel ekz. en Italujo, Francujo kaj Hispanujo.

Sed – ekde marto publikaj aranĝoj estis malpermesataj – ankaŭ go-turniroj kaj ludvesperoj. La germana go-asocio havas ĉirkau 2500 membroj. Normale oni povas partopreni en semajnfinaj (sabato/dimanco) go-turniroj en 2 5 lokoj kaj en la najbara eksterlando. Germanujo ja estas relative granda, do oni povas elekti, kie ludi en sia najbareco aŭ aliaj interesaj urboj. La nombro de partoprenantoj estas ĉ. de 30 ĝis pli ol 100. Jes, en tempo de interreto oni ne estas devigata ludi interesajn partiojn je turniroj, sed ludi antaŭ lignotabulo kun veraj homoj estas alia, pli bona, afero. Plej ofte oni renkontas malnovajn go-amikojn. La komunumo ne estas tiel granda – do, multaj konas la aliajn, speciale ĉirkaŭ sia propra ludforteco.

Kiel nun fari dum corona-tempo? Mi aŭdis, ke preskaŭ ĉiuj go-kluboj aranĝis siajn ludvesperojn nun en la interreto. Ĉi-tie en Germanujo la plejmulto de la go-ludantoj uzas la KGS-servejon. Simpla afero por go-ludantoj – piedbal-ludantoj ne tiel simple povus ludi en interreto! Kaj la normalaj, parte jam delonge planitaj go-turniroj elfalis. Ankaŭ la plej granda go-aranĝo en eŭropo – la Eŭropa Go-Kongreso kun 2-semajna turniro kaj aliaj aranĝoj dum tiuj 2 semajnoj – elfalis 2020.

3 junaj go-ludantoj sub gvidado de Marc Oliver Rieger do havis la ideon, aranĝi semajnfina go-turniron en la interreto. Preskaŭ la samaj kondiĉoj kiel en „ĝusta“ turniro: 5 raŭndoj kaj 1 horo pensadtempo. La partoprenintoj venis el ĉiuj anguloj de Germanujo, plej bele miksitaj ol normale. En la germana go-revuo ili skribis longan artikolon pri la organizado, instalita/uzita tekniko, ktp., ĉar ĝi estis la unua vera semajnfina interreta turniro – tre interesa, eble ili organizos saman turniron, eĉ se la corona-tempo estas preta. Nun dum la

lastaj semajnoj – la infekcioj kun corona-viruso reen iris – turniroj en Laipzig (Lajpcigo), Hamburgo kaj Berlino denove povis okazi. Sed estis normoj de ŝtataj aŭ urbaj instancoj – ili devis halti 1,5 metroj interspaco, nur limigita nombro de partoprenantoj. Ili devis antaŭe anonci kun kompleta adreso Sed nova komenco kaj ni esperas, ke ekde aŭgusto/septembro ni preskaŭ havos la „malnovan“ turnir-scenon kiel antaŭ la corona-tempo.

Matthias Reimann

人は様々なゲームで楽しむ10

Homoj ĝuas diversajn ludojn 10

上毛かるた (Kartoj de Ĵooŝuu)

かるたと言えば、いろはかるたが元祖でもあり有名だが、今ではそれぞれの地方で様々なかるたが作られている。しかしその中で、私の住んでいる群馬県の上毛かるたが、いわば元祖のようなものではないかと思っている。

『上毛かるた』は、昭和22年12月に誕生した。敗戦、国中が荒れ果て、食べるものも着るものも十分でなく、人びとの心は悲しみや無力感であふれていたため、浦野匡彦氏が、「このように暗く、すさんだ世の中で育つ子どもたちに何か与えたい。明るく楽しく、そして希望のもてるものはないか」と考えて『上毛かるた』が誕生した。



内容は、群馬県の歴史、産業、偉人、観光などを網羅し、学校でも教える？あるいは大会を開くので、群馬県の子どもは誰でも読み札のすべてを知っている。いわば、群馬県人のパスポートのようなものだ。

一番重要な札は、「鶴舞う形の群馬県」で、他県の人には全く知らないが、群馬県の形は、鶴が舞っている形である。その他、有名人の読み札を紹介すれば、「心の灯台内村鑑三」「誇る文豪田山花袋」。こんなのは群馬育ちならだれでも暗唱している。

最後に、今年「エスペラント動物かるた」というのを作ったら、予想に反して100セットがあつという間に売れて在庫はわずかだ。800円。

Leteroj de s-ro Sakurai Nobuo (1)

La 19an de julio 2020


Estimataj samideanoj,

Hodiaŭ mi havis mian 85-jaran naskiĝdatrevenon, do nun mi estas 85-jara. Mia vivo proksimiĝas al la fino. En la fino mi volas lasi libroforme mian verkon tra mia vivo je eventuala intereso de miaj kamaradoj. Mi intencas daŭrigi la planon dum kelkaj jaroj ĝis la fino de mia vivo. Mi volas sendadi al vi la resumojn sinsekve laŭvice por kuraĝigi min mem. Do mi petas vian indulgon.


La enhavo konsistos el meditoj, eseoj, poezioj, anekdotoj, humoraĵoj, kantoj, leteroj kaj tiel plu. Mi estus dankema, se vi skribus al mi viajn opiniojn pri tio de tempo al tempo. Mi komencas skribi el miaj verk-kajeroj.

Medito 1

- 1. Eĉ se la arbo falus, restigu almenaŭ la radikon.*
- 2. La sueprstiĉo apartenas ne sole al la antikva epoko aŭ la nekulturita socio.*
- 3. Ne forgesu, ke ni vivas en la mondo, kie ekzistas la armilo.*
- 4. Tra nia vivo la morto estas la sola escepto.*
- 5. La vivo estas unu sonĝo. Kiam venas al vi la morto, vi revekiĝos de la sonĝo. Strebu tiel ke vi povos certigi al vi, ke vi havu belan sonĝon antaŭ la vekigo.*
- 6. Se konkuras la kreado kaj la detruado, la venko de la detruado estas konsekvenco.*
- 7. Vivi estas bruli kaj bruli estas ami.*
- 8. La vivo ne ĉiam estas bela.*



9. Ĉiam pripensu, kio estas natura kaj kial tio estas natura.
10. Mi deziras havi amatinon en la koro ĉiam tenantan la revon.
11. Tiu, kiu havas plenan forton, volas montri sian kapablon, sed tio minacas pacemajn homojn.
12. La saĝulo estas tiu, kiu ne regas la socion sed kiu adaptiĝas al la socio.
13. La doloro havas meriton, nur kiam ĝi provas elteneblon.
14. La amo estas bela, kiam vi legas la romanon, sed kiam vi ekamas reale, vi ricevas nur mizeron kaj doloron.
15. Tenu paciencon dekstramane kaj kuraĝon maldekstramane.
16. Se vi havas inklinton al la belaĵo, vi devas kompreni, ke kio ju pli bela, tio des pli facile rompebla.
17. La studado de la matematiko similas al la montgrimpado de la cerbo.
18. Senpasia kapo kaj varma koro malofte kunestas.
19. Trovu bonajn ideojn, kaj vi povos solvi preskaŭ ĉiujn problemojn.
20. La genia kreaĵo estas neniel teknikeca.
21. Tiu, kiu havas elstaran instinkton, neniam eraras, kaj tiu, kiu havas elstaran intelekton, ne ripetas eraron.
22. La amo sen afableco ofte kaŭzas la malamon.
23. La homo ne povas vivi nur kun pasintaj memoroj, ĉar la homo vivas ĉiam kun la direkto al la estonto.
24. La brilaj okuloj pro intelekto estas firmaj, kaj la brilaj okuloj pro amo estas dolĉaj.



Mi deziras al vi ĉiuj sanon kaj feliĉoj el mia tuta koro.

Ilustruaĵoj: HORI Jasuo

Naŭ gradoj en Goistoj kaj la Nova GO-programaro

En novembro de jaro 2019, ekvendita estas nova GO-programaro, nomita “入神の囲碁” (NYUUSIN NO IGO, mallongiĝos kiel NNI), kiu signifas “GOo de En-diiĝanto”. En tiu ĉi artikolo, klariĝos antikvaj naŭ gradoj en Goistoj kaj la programaro NNI.

En antikva ĉina go libro titolita “玄玄碁経” (japane: GENGEN GOKYOU), kiu signifas “malklare kompleksa GOa sankta skribaĵo”, gradoj de Goistoj estis skribitaj kiel jene;

“入神:九段,名人” (NYUUSIN) Eniĝi en dioj: la 9a DANulo, Majstro; kuj atingis nivelon de GOa sanktulo,

“坐照:八段,準名人” (ZASYOU) Sidiĝi tuj kompreni: la 8a DANulo, Vicmajstro; kiu kvazaŭ lumigas la tabulon tuj post la sidiĝo,

“具体:七段,上手” (GUTAI) Konkreta: la 7a DANulo, Lertulo; kiu ankoraŭ ne estas perfekta sed en reala ludo tre forta ambaŭ en atako kaj en singardo.

“通幽:六段” (TUUYUU) Koni la misteron: la 6a DANulo, kiu bone komprenas la GO-ludon kaj tute konas la misteron.

“用智:五段” (YOUTI) Uzi intelekton: la 5a DANulo, kiu dependas sian intelekton,

“小巧:四段” (SYOUKOU) Teknika: la 4a DANulo, kiu havas teknikojn por formaciado, batalado, lim-aranĝado, k.t.p.,

“闘力:三段” (TOURYOKU) Batalfora: la 3a DANulo, kiu venkas nur per sia batalforto,

“若愚:二段” (ZYAKUGU) June stulta: la 2a DANulo, al kiu mankas plena forto, sed havas iun potencon,

“守拙:初段” (SYUSETU) Singardeme mallerta: la 1a DANulo, kiu sekvas la batalmodelojn evitante batalojn.






La nova GO-programaro NNI estas komponita de pluraj programoj, la ĉefa programo “Ray”, la vica “MiniGo” kaj aldonitaj pli fortaj programoj kiuj estas specialigitaj por 19x19 tabulo. La vendisto diras “NNI estas pli forta ol profesiula 9a DANulo. Kaj se via komputilo havas aldifinitan grafikan procesoron kaj sufiĉan memorilon, vi povas ludi kun la pli fortajn programojn, “Rn”, “ELF OpenGo”, aŭ “Raynz”, kiuj gajnis altajn rangojn en la lastaj turniroj de Altefaritaj Intelktoj (mallongiĝos kiel AI).

Mi prenante Nigron sen handikapo kun la AIoj ludis laŭ mia maniero, ŝtonmeti la unuan meton sur zenito (la 10-10 punkto de 19x19 tabulo). Kaj en la fino de formaciado, la procento de la ebleco por Nigra venko, malmultiĝas je ĉirkaŭ 10 procentoj. Vere tre severa estas altnivela formaciado.

Sed bedaŭrinde NNI enhavas kelkajn defektojn.

Sur 9x9 tabulo, la programo “Ray” kaj “MiniGo” ŝajnas esti ne tiel forta kiel profesiula 9a DANulo. Laŭ mia sento, kiam mi prenas Nigron sen KOMioj sur 9x9 tabulo, iome malnova programo ZEN6 estas pli malfacila por venki.



SupreMalDekstra; “Ray” sur 9x9 tabulo ŝajnas ne tiel forta kiel ZEN6 en prova ludo sen KOMioj. Mi Nigro venkis je Blanka rezigno.

SupreDekstra; “MiniGo” ŝajnas esti pli forta, sed ĝi eraris en la lasta etaĝo, sufokado de la neŭtralaj punktoj, lasante sian difekton, kiel B40. (B34 sur 27 kaj N39 sur 30).

MalDekstra: “Zen6” estis ekvendita en 2016, kun forteco je amatora 7a DANo.

Sed mi, prenante Nigron sen KOMioj sur 9x9 tablo, tre malofte venkas ĝin, kaj taksas ĝin la plej forta en tiu ĉi kondiĉo. (N31 sur 10)

MORI Hitosi

予想

桜井 信夫

コロナ後の世の中について予想される動きを考える。

2013年Go-Amiko135号に私が書いた「紙の力」と題した記事をご記憶だろうか。世の中はその記事の予想通りに動いて、現在国債の発行額は上限を持たなくなってきた。そこで予想されるのは今後お金持ちは不動産にシフトするだろうということ。食べ物や衣類は有り余っているが、土地は限度があるからである。既にその動きは始まって、その辺のことにする本がかなり出始めている。ただし、マスコミがこれについて書き始めるのはまだ数年先であろう。また、政府が買い占めの対策を講ずるのはさらに先になるだろう。

一方、エネルギー源については、蓄電設備も整ってくれば、自然から直接得られる風力、水力、太陽光が中心になって行くだろう。そうなれば問題を含んだ原子力、火力、などを避けて、世界中に届く太陽エネルギーの恩恵を受けて、エネルギーの奪い合いをすることもなくなると信ずる。よく太陽光だけでは足りないということを聞くが、私の家の屋根で得ている太陽光の量から推して、不足するとは考えられない。すなわち、反対する電力会社の言い掛かりとしか考えられない。太陽光電力は民間でも得られるから、大手電力会社にとっては脅威である。大手電力会社はあがき続けざるを得ないだろうが、最後は既に見えている。


今後の不正取引、汚職等は、これまでも多かったが、不動産に係わるものばかりになりそうである。

数十の公用語を使用するEUはいずれ一つの公用語を必要とするだろう。だが、力関係から、アメリカに従属する英語を採用するわけにはゆかず、力関係のギリギリの妥協策として、エスペラントを採用することになるかも知れない。しかし、それは現実の政治力の最後の妥協策として行われるのであって、決してザメンホフの人類愛が受け入れられたのではなく、むしろ、そうした現実から、エスペラントはかなり歪められたものになり得ることも、エスペランティスト達は知っていなければならない。

むしろエスペラントの公用語としての役割が、アジアやアフリカから始まるのが望ましい、おそらく、ヨーロッパの人々にとっても。

Go-ekzercaro por komencantoj (23)

Kiamaniere kaptu du kaj tri blankajn ŝtonojn kune?





Respondo A: Bona

N-1 estas bona. Post B-2 per N-3 la blankaj 6 ŝtonoj kaptiĝas.

Respondo B: Malbona


N-1 estas malbona. Per B-2 la nigraj 6 ŝtonoj mortas.



La problemo 267

Nigro havas meton.


Prave dirite, ke la angulaj du punktoj 2-1 kaj 2-2 estas gravaj. Kiu estas ĝusta en ĉikaze?



La problemo 268

Nigro havas meton.

Kiu atako estas pli efika de interne aŭ de ekstere?



La solvo 267-a

Alternekapto rezultas.

Fig. 1-a. (La solvo) La tuŝo N-1 estas la esenca punkto. Al B-2 sekvas ĝis B-6 ripetite la kapto kaj rekapto plurfoje kaj poste N-7 realigas la alternekapton.

Fig. 2-a. (Malsukceso) Al N-1 Blanko ligas B-2, kaj poste al N-3 sekvas B-4, Nigro kaptas du ŝtonojn kaj Blanko rekaptas kaj nenia rimedo plu por Nigro




fig. 1-a.

④ = △rekapto, ⑤ = ③rekapto




fig. 2-a.

⑤ : rekapto supre de ④
⑥ = ④

La solvo 268-a

La blankaj ŝtonoj mortas.

Fig. 1-a. (La solvo) La meto N-1 estas la vitala punkto.

Fig. 2-a. (Daŭrigo) Al la ligo B-2 sekvas ③ kaj ⑤. Tiel la blankaj ŝtonoj falas en la sufokiĝon kaj mortas.




fig. 1-a.




fig. 2-a.

Fig. 3-a. (Vario) Al B-2 oblikva ligo sekvas N-3 tranĉo. Poste se Blanko ligas kiel B-a, Nigro povas lasi la meton, ĉar Blanko ne havas rimedon pluan.

Fig. 4-a. (Malsukceso) Al la kaptio N-1, N-3 Blanko sekvas B-2, B-4 facilanime. Kaj la blanka vivas kun sufiĉa spaco.




fig. 3-a.




fig. 4-a.

Fig. 5-a. (Malsukceso) La aliflanka minaco N-1 estas unu procedo. Tamen B-2 la diskreta respondo estas bona kaj al N-3 ankaŭ la procedo por Nigro, B-4 estas la ĝusta respondo kaj la blanka ŝtonaro vivas.

Fig. 6-a. (Malsukceso) N-1 aspektas kiel vitala punkto, kaj sekvas ĝis B-6. La rezulto montras ke la blanka vivas. Kvankam poste Nigro havas rimedon konduki al la kunvivo per N-a, tamen tio estas nesekviga.




fig. 5-a.




fig. 6-a.

Laborplano de JEGA

1. 役員 Estraranoj 代表：堀泰雄（群馬）書記：森均（滋賀）

会計：桜井信夫（東京）桜井さんは、また名誉代表者。

Reprezentanto: HORI Jasuo, Sekretario: MORI HItoŝi, Kasisto: Sakurai Nobuo

2. 行事 Eventoj

・新年例会 2020年1月13日(成人の日) 大崎囲碁クラブ 開催
Novjara kunsido: la 13an de januaro 2020 Okazis.

・5月合宿 ・UKで ・日本大会で 分科会をもつ
Kunsidoj en Jacugatake kaj Japana Kongreso, Movada Foiro dum UK estis nuligitaj.

3. 会報(Go-amiko)

・発行は年3回とし、4月、8月、12月に発行する。
Ni eldonos la revuon 3 fajojn: aprilo, aŭgusto, kaj decembro
・"GO-Amiko"の記事は原則として Esperanto または Du-lingva とする。
La artikoloj estu skribitaj en Esperanto aŭ dulingve.


4. 会費 Kotizo

・日本人会員は1000円(寄付をしたい方は1500円プラス) 1000 enoj por japano
・外国人会員は、無料だが、EGLIの趣旨に賛同し会員となる方からは10ユーロ頂く。
10 eŭroj por eksterlandano

5. 出版計画 どんな出版が良いか、考える。

6. 書籍などの扱い Niaj libroj pri Go

・"Invito al GO-Ludo"は無料配布。 Invito al GO-ludo: senpaga.
・"Fundamento de Taktiko kaj Strategio de GO-Ludo": kun pago
・小碁盤(九路盤)はUK等では無料配布。 Tabulo de 9x9: senpaga.



Japana Esperantista Go-Asocio (JEGA) 日本エスペランチスト囲碁協会
Esperantista Go-Ligo Internacia (EGLI) 世界エスペランチスト囲碁協会
UEA-konto: egli-f

Retejo: <http://jega.shisyou.com/jega/index.html>

Adreso: 2-13-3 Ootone, Maebaŝi, Gunma, Japanio, 371-0825, Japanio

Ĉe HORI Jasuo 371-0825 群馬県前橋市大利根町2-13-3 堀泰雄方
retadreso: horizonto@water.sannet.ne.jp 電話:027-253-2524